"Precize" respondis la Ĉapelisto, ekĝemante. "Ĉiam la tehoro, kaj neniam ni havas intertempon eĉ por viŝi la ilojn."

"Do, vi ĉirkaŭmovas vin?" demandis Alicio.

"Precize" diris la Ĉapelisto "laŭ eluzo de la manĝiloj."

"Sed kio okazas" Alicio kuraĝis demandi "kiam vi denove revenas antaŭ la unue uzitaj?"

—"Ni ŝanĝu la paroltemon" la Martleporo interrompis, oscedante. "Ĉi tio enuigas min! Mi proponas ke la Fraŭlineto rakontu al ni fabelon."

"Bedaŭrinde, mi eĉ ne unu povas memori" diris Alicio. La propono ja timigis ŝin.

"Do, la Gliro devas" ambaŭ kriis unuvoĉe. "Vekiĝu, Gliro!" Ili pinĉis ĝin sur ambaŭ oreloj samtempe.

La Gliro malrapide malfermis la okulojn, kaj diris per raŭka, malforta voĉo: "Mi ne dormis; la vortojn, kiujn vi ambaŭ diris, mi aŭdis ĉiujn, ĉiujn senescepte."

"Vi rakontu al ni fabelon" diris la Martleporo.

"Jes, bonvolu, mi petas" Alicio diris petege.

"Ankaŭ ne prokrastu" aldonis la Ĉapelisto "ĉar, se vi prokrastos, vi nepre re-endormiĝos antaŭ ol fini."

La Gliro tuj komencis, tre rapidante:—"Estis iam tri fratinetoj, kiujn oni nomis Elnjo, Lanjo, kaj Tinjo. Ili loĝis ĉe la fundo de tre profunda puto."



"Kion do ili manĝis?" diris Alicio. (La demandoj pri manĝaj kaj trinkaj aĵoj ĉiam havis por ŝi specialan intereson.)

Post du minuta konsiderado la Gliro respondis: "Ili nutris sin per melaso."

"Tion ja ili ne povus" Alicio protestis tre ĝentile, "ĉar ili fariĝus malsanaj."

"Kaj fakte *estis*" diris la Gliro "tre malsanaj."

Alicio penis imagi al si, kiaspeca estus la vivo, se ŝi loĝus en putfundo kaj nutrus sin per melaso; sed la peno estis tro konfuziga, sekve ŝi demandis: "Kial ili loĝis en la putfundo?"

—"Prenu pli da teo" diris al ŝi la Martleporo, kun tre serioza mieno.

"Ĝis nun mi havis neniom" respondis Alicio, ofendite, "sekve mi ne povas preni *pli*."

"Denove vi malpravas" intermetis la Ĉapelisto. "Ĉu vi ne devis diri ke vi ne povus preni *malpli*? Tre facile ja estas preni pli ol neniom."

"Neniu petis *vian* opinion" diris Alicio indignante.

"Ho, ho!" triumfe kriis la Ĉapelisto. "Kiu *nun* rompas la regulon pri personaĵoj?"

Al tio Alicio ne povis trovi taŭgan respondon. Sekve ŝi servis al si teon kaj buterpanon, kaj

LEWIS CARROLL La Aventuroj de Alicio en Mirlando Esperanto translation (Illustrated by Brinsley Le Fanu) LONDON, 1910 THE BURSTEIN COLLECTION Octavo